

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj administracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E.J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo,) Eusebio. Maynar (Hispanujo), Prof. H.G. Wannemakers S.J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W.J.A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono.).

## LA REDAKCIA DISCO

Jen la novembran numeron en iom pli dika vesto, tial ni povas doni en 1952a la normalan kvanton da legaĵoj. Devus esti almenaŭ ĉiun monaton tia numero. Kial ne? Bonvolu legi la malsupraĵajn vortojn, kiujn mi trovis en E.K. de Novembro 1927a. Ili ankoraŭ plene validas.

En ĉi tiu numero vi trovos denove artikolon pri la familio, sed nun laŭ la komunista sistemo. Per tio ni ŝanĝas nian praktikon, ne nian opinion. Ĉar dum la lastaj 5 jaroj ni opiniis saĝe ne tikli ion pri komunismo, ktp. Ni esperis ke tiamaniere ni almenaŭ povis iomete helpi al niaj katolikaj samideanoj malantaŭ la fera kurteno. Tio espero estis vana! Nia opinio estis fiktivaĵo! Ne ekzistas ebleco resti senkolora en tia grava problemo. Ĉiu persono en la mondo devas elekti en ĉiuj aferoj. Ni faris ĝin en nia revuo. Tio ne signifas ke de nun ni ofendu komunistojn ktp., ĉar laŭ S-ta Aŭgusteno ni devas malami la herezon, sed ami la herezulojn!

La Internacia Katolika Informoficejo en LOONOPZAND (Nederlando) kiu praktikigas en plej pura senco la katolikan esperantistan idealon estas en danĝero. Legu la artikolon. Bonvolu pripensi ke ĝi rilatas kun 1907 personoj el 61 landoj. Tiu informo estas senkosta, tamen kostas multe. Bonvolu fari kion via koro indikas. Kie? Eksterlande, se ne rekte al la oficejo, vi povas sendi vian kontribuon al niaj reprezentantoj, kiuj zorgos pere de nia oficejo, ke via donaco atingos sian celon. Aŭ plibone:

Abonu la revuon "Vojo-Vero-Vivo" kontraŭ 1.25 fl. aŭ 6 Int. Rpk.

Unu el niaj kunlaborantoj ricevis belan distingon pro siaj meritoj. Ni gratulas lin.

Pli poste vi povas legi ke ni funebras kelkajn samideanojn. Tio signifas, ke nun la dua generacio de esperantistoj iom malaperos. Ĉu vi jam pripensis kion fari por ke via idealo estu transportata de aliaj? Ĉu vi scias ke plej ofte la junularo nur formas idealojn, kaj ke ili konservas ilin tra la tuta vivo, kaj ĝis la morto batalas por la realigo? Jen la vojo!

Vi povas legi pri nia venontjara kongreso. Ni verkas ĉi tion tuj antaŭ la presigo, kaj ne ankoraŭ ricevis la lastajn detalojn. Se ili alvenos en kelkaj horoj, vi trovos aliĝilon en ĉi tiu numero. Legu ĝin atente kaj agu precize laŭ ĝi. Ĝis la venonta elveno!

## LA FAMILIO MALANTAU LA FERA KURTENO

Ni sidas, pensas kaj vivas kvazaŭ premitaj inter du grandpovaj kolosoj. Okcidente ni vidas la liberan vesperlandon: la malnova Eŭropo, profunde kaj grave vundita de la ambaŭ mondmilitoj, tamen konservanta sian karakteron. Oriente ni vidas kiel malluma minacon la misteran Sovjet-Union ĉirkaŭatan de multnombraj vasalŝtatoj.

Oni scias sufiĉe kion la okcidentaj landoj opinias kaj faras rilate la familion. Ĉar dum la lasta jaro la "Internacia Unuiĝo por la Familiaj Organizoj" kongresis en Zurich (Svisujo) kaj en Oxford (Angelujo). La programpunktoj nur estis familiaj problemoj.

Tamen estas tre interese esplori: Kion oni diras kaj publikigas en la komunistaj ŝtatoj pri la familio.

Tre simple oni prezentas du episodojn:

I. De post la revolucio en 1917a ĝis 1935a: dissolvado kaj ruinigado de la familio. La libera amo. Oficiale permesata abortigo kaj tre facila ekседziĝo.

II. De post la publikigo de la tria sovjeta konstitucio en 1936a (same kiel post la granda reformigo de Molotov en 1944a) ĝenerale oni returnas al la fiksita familio, kun tre avantaĝaj stimuloj al naskoj, kaj kun alta estimo kaj reala subteno por la infanricaj familioj, kaj kun vera honorigo por la patrino de multnombra familio, per la fondo de nacia insigno por la "Patrino-Heroino".

Tamen la afero estas: Ĉu la nuna evoluita opinio pri la familio estas sincera kaj fidinda? Ĉu la revivigo de la familio malantaŭ la fera kurteno estas pro la vera valoro mem de edziĝo? Aŭ ĉu tio estas por la bono de la komunista ekspansio kaj propagando?

Se ni esploras kaj ekzamenas la skribitajn tekstojn kaj leĝojn, ni baldaŭ konstatas ke la reformigo de post 1936a grandparte estas trompo. Ne pro la valoro de la familiaj ligoj, sed nur pura propagando por subteni la potencon de la Sovjet-Unio.

### Unua Akto: 1917-1935

La edziĝo estas insulte nomata kiel restaĵo de la malnova kapitalismo; kiel trompa "Fasado de malgrand-burĝa honesteco". Oni pretendas ke la Sovjet-ŝtato finfine liberigos la laboristojn kaj la kamparanojn definitive de la premantaj ligiloj de edziĝo kaj familio.

La ekstremisto de la pensoj, Lenin, senhezite skribis en la partijurnalo "la Pravda" de la 21a de Septembro 1935a:

"La potenco de la Sovjetoj efektivigis por la liberigo de la virino kaj por ŝia samrajtigo kun la fortaj seksuloj en du jaroj, kion en 130 jaroj ne povis atingi la progresivaj, klerigitaj kaj demokraciaj ŝtatoj de la tuta mondo."

"De ĉiuj malaminspirantaj leĝoj pri la malegaleco de la virino, pri la malfaciligo de la ekседziĝoj, pri la neleĝeco de eksteredziĝaj infanoj pri la serĉado de la patro, ktp.ktp., de ĉiuj tiuj leĝoj, kiuj lasis tion da postesignoj en la civilizitaj landoj je la plej granda honto de la burĝaro kaj de la kapitalismo, ni vere kaj reale ne lasis unu ŝtonon sur la alia".

Tiel parolis kaj skribis la kondukanto en sia kruda kaj nuda sincereco, kaj liaj sekvantoj, la oficialaj edukantoj kaj instruistinoj, skribis jam pli teruraj vortoj. Ekzemple, Lilina, inspektorino de la lernejoj en Leningrad: "Ni devas liberigi la infanojn de la malbona influo de la Familio". Kaj alie: ".....la zorgo por la eduko kaj la instruo de la infanoj devas kiel eble plej baldaŭ esti en la manoj de la komunumo".

Kun tiaj tezoj kaj frazoj la natura familio estis disformigata kaj ruinigata en tre mallonga tempo. La virinoj fariĝis pli sovaĝaj ol la viroj kaj la viroj ankoraŭ pli furiozaj ol la virinoj: tio estis la egaleco de la seksoj! Ĉiuj diferencoj inter edziĝaj kaj eksteredziĝaj infanoj malaperis. La ŝtato subtenis kaj propagandis la abortigon.

Estis rapida vetkuro al la perco kaj la tempo devis evoki reformadojn. Kaj vere post 1935a, je la publikigo de la tria konstitucio de Sovjet-Rusujo efektiviĝis rimarkinda aliĝo en la pensoj kaj en la reala praktikado de la vivo

Dua Akto: 1935-mmm.

Vere en artikolo 10a de la konstitucio staras: "La rajto de la ŝtatanoj je persona posedaĵo, je ilia loĝejo kaj koncerna mastrumo, same kiel la rajto de heredeco estas garantiata de la leĝo"

Ĉu multaj ne pensus ke tiaj frazoj el la konstitucio sonas "malgrandburĝe"? Certe, se ne laŭ la enhavo, tamen laŭ la formo kaj la stilo.

Ankaŭ pri la familio kaj la edukdevoj laŭtas alia tono. Eĉ oni kredus je sincera konvertiĝo. Jen la Pravda: "ni ne prijuĝas komuniston sole laŭ lia laboro, kiun li liveras. Ni ankaŭ prijuĝas lin laŭ la maniero en kiu li edukas siajn infanojn... Se li edukas ilin malbone, tiam li estas malbona komunisto". Nun la leĝdonanto celadas al la "stabileco" de la edziĝo. Oni limigos la eksedziĝon, kaj kontraŭos la abortigon forte pro medicinaj kaj higienaj motivoj.

Diversaj naciaj distingoĵoj estas fondataj kaj disdonataj:

- a) La Medalo por la Patrino (5 infanoj);
- b) La Ordeno de la Gloro de la Patrino (7 infanoj)
- c) La titolo: "Patrino-Heroino" (10 infanoj)

Nun oni kredus ke Rusujo estas konvertiĝinta... almenaŭ rilate la edziĝon, familion kaj patrinecon. Kaj kelkaj gravaj aŭtoroj kredis tion kaj diskonigis tion!

Tial patro prof. o. Zacharias O.F.M. Cap. (je la katolika universitato de Nimego en Nederlando), kiu dum multaj jaroj laboris en Orienta Eŭropo, havas grandan meriton ke li konstatis post longedaŭra kaj intensa esploro: ke ne la familio pro si mem (kiel spirita unua socia ĉelo) estas honorata de la Sovjetaj leĝoj. Ne, la leĝoj nur protektos la familion, kiel nasklokon de nova kaj abunda vivo profite de la Ŝtato! Protektante la familion la Ŝtato subtenas sin mem kaj pligrandigas sian potencon. Ĉar la Sovjet-propagando publike laŭtas: "Ni bezonas homojn".

Tial la menciitaj naciaj distingoĵoj estas donataj same al edziniĝintaj kaj al ne-edziniĝintaj patrinoj, el kio pruviĝas ke nur la profito de la Ŝtato estas grava.

Alia pruvo pri tio estas, ke la patrinoj devas esti liberigitaj de la ĉiutagaj kaj malgrandburgaj hejmaj taskoj. Tiel la familio dependas de la industriigaj planoj de la Ŝtato. La rusaj virinoj nasku abunde novajn kaj fortajn vivaĵojn, por baldaŭ konfidi siajn infanojn al "Ŝtataj infangardejoj", por ke la patrinoj parteprenu la eksterdoman fabriklaboron. La infano al la Ŝtato. La patrino al la laboro. Tia estas la devizo de la Sovjet-Unio! Tio estas la rifuzo de ĉio, kio estas natura, sankta rilate la familion. Estas bone scii tion!


J.

## S E C I U

Se ĉiu volus diligente klopodi, se ĉiu volus efektiviĝi per agoj siajn bonajn intencojn kaj la bondezirojn, kiujn ĝi eldiras por la sukceso de ESPERO KATOLIKA, kiel, en malmulte da tempo, kreskus la eldonnumero de la gazeto! Kaj la eldonnumero estus unu el la ĉefaj kondiĉoj de la influo de gazeto. Kaj nia revuo devas akiri grandan influon en Esperantujo.

Ke ĉiuj, kiuj konfesas la utilon de ESPERO KATOLIKA, profitas do tiun jarfinon por varbi grandnombre novajn abonantojn al nia organo, kiu ne pre bezonas, ĉi tiun jaron, 500 novajn, por pli kaj pli fariĝi teknike belaspekta kaj enhavriĉa. (E.K. Novembro 1927)

Ĉiu kiu varbos 3 novajn abonojn por la jaro 1953a ricevos sian abonon senpage. Ĉu ni povos vidi vian nomon en tiu honora listo?



*En la sekvantaj linioj hungara katolika esperantisto, kiu nun laboras en Aŭstralio, rakontas kion li spertis en Vieno, tuj post kiam li sukcesis trapasi la limojn, laŭ kiuj la fera kurteno etendiĝas nord-suden. Ni scias ĉiujn detalojn, nomojn, ktp, tamen vi permesu ke ni donu fikтивajn nomojn, por ke la rilatantaj personoj kaj familianoj ne havu malfacilaĵojn nedeziritajn.*

Nur tre malrapide mi povis surpriniri la stuparon al la unua etaĝo. Peze mi levis miajn piedojn, ŝajnis ke ili ne volas obei al mia volo. Tio estas natura, mi pensis, ĉar dum du tagoj mi nur vivis el maldika supo kaj akvo, do la fortoj jam

estis for. Antaŭe la peniga piedirado kaj la ekscitaj malfortigis min. Sed tamen mi sentis min feliĉa en la granda libereco kaj mi pleniĝis de espero. Sukcese mi traboris la feran kurtenon kaj nun kun malsata stomako kaj nenio en la manoj mi estis en Vieno.

Fine mi atingis la unuan etaĝon de la paroĥejo. Nur kelkajn paŝojn de mi estis pordo tra kiu mi devis iri por peti konsilon por miaj sekvontaj vojaĝoj, kaj ne lastvice manĝaĵojn, kiuj momente estas tre necesaj. Timeme mi frapis al la pordo. Mi ne devis longe atendi, ĝi malfermiĝis. "Bonvolu eniri", ekparolis Patro Kvireno (mi ekkonis lin, ĉar la antaŭaj rifuĝintoj priskribis al mi lian staturon.) Mi troviĝis en granda antaŭĉambro, kie estis nur kelke da simplaj mebletoj. La Patro tuj vidis, ke mi ne povas bone paroli germane. Per mano li montris al seĝo por sidiĝo. "Kiel bone estas, ke mi lernis iomete ankaŭ germane en la lernejo," mi pensis. La Patro montris tre malvarman ĝentilecon al mi, kio estis memkrompreneble, ĉar lin vizitis centoj da senlaboruloj, mallaboremuloj kaj vagabundoj ĉiutage. Ili petis manĝaĵon kaj monon, alude sian religion katolikan. Ankaŭ mi diris al li la celon de mia vizito. Per malbona lingvoscio germana - pli multe per la manoj - mi rakontis ke mi ĵus alvenis de malantaŭ la fera kurteno, petante lin por iom da helpo, kiel eble li povas. Mi parolis tre mallonge, sed mi sciis ke eĉ tiel li komprenas min observante mian palan vizaĝon. - Ĉu vi estas katolika? - li demandis.

- Jes, - mi respondis.

- Ĉu vi povas pruvi tion per skribaĵoj aŭ alimaniere? -

- Mi tute ne havas ian aĵon por pruvi mian religion, - mi respondis.

Ankoraŭ li demandis kaj parolis multe al mi, sed mi ne komprenis. Kaj fine li diris: - Ĉu homo povas aserti katolikan religion, rifuĝintecon, eĉ bonan homon. En tiu ĉi afero mi ne povas helpi vin. - Mi estis tro laca por plue paroladi kaj konvinki lin. Jam mi komencus ekstari dirante: - Se vi ne povas helpi al mi, mi trovos iun, kiu kredas al mi.

- Kien vi iras nun? - li demandis.

- Mi klopodos trovi esperantistojn en Vieno, - mi respondis.

- Ĉu vi parolas esperanton? - Eĉ mian respondon li ne atendis kaj dauris

- Se vi estas esperantisto kaj vere katolika, ĉio devas esti en bona ordo ĉar vi povas diri al mi "Patro nia....."esperantlingve, ĉu ne? -

Iu varma sento ekkuris de mia koro al mia kapo. Jam pasis longa tempo, de post mi parolis esperantlingve kaj ankoraŭ pli longa tempo ke mi lernis "Patro nia" en esperanto. Dum kelkaj minutoj mi devis serĉi vortojn kaj nur balbutante, malrapide mi diris: "Patro nia, kiu estas en la ĉielo, Via

Nomo estu sanktigita. . ktp." Mi ne povis diri la tuton, ĉar en la okulo de Patro Kvireno ekbrilis kara rideto kaj nun ankaŭ varma voĉo ekparolis en mia nacia lingvo. - Mi bone komprenas vin, ŝajnas al mi ke vi diris ĉion latinlingve.- Poste li aldonis: - Iru al la ŝranko, malfermu ĝin kaj prenu tiom da konservitaj manĝaĵoj, kiom vi povas kunporti. Ĉu vi bezonas iom da mono? Eĉ vojaĝbileton mi povas doni al vi, per kio vi atingos Germanujon, kie vi trovos sekurecon kontraŭ la danĝeraj rusaj soldatoj, kaj tie I.R.O. (Internacia Organizo por Rifugiintoj helpas vin. Denove mi povis nur malrapide iri de la etaĝo ĝis en la strato, sed ne pro laceco, sed pro la ŝarĝoj de diversaj pezaj skatoloj, kiuj estis plenigitaj de manĝaĵoj. La printempa suno akre alfrapis mian okulon, mi reen ridetis ludeme. Dume la preterpasantoj turnis al mi kun stranga mieno. Ili supozis min fremdulo, palvizaga ridetanta homo, kies manoj kaj poŝoj dikiĝis de diverskoloraj paketaĵoj. Jes, mi estis fremdulo por ili en granda urbo, kie krom mia religio kaj esperanto mi havis nenion kaj tiuj duoj nun renkontis unufoje en mi. Ĉiu laciga sento malaperis el mi kaj mi estiĝis gaja. Mian animon tute regis viviga entuziasmo, dume mi ripetadis mallaŭte zumante: "Ne al glavo sangon soifanta, ĝi la homan tiras familio".

De post tiu tempo mi atingis Germanujon, kaj eĉ Aŭstralion. Nun mi estas malproksime de la Fera Kurteno kaj ties suferigaj memoroj antaŭaj. Kun renovigita vivoforto mi laboras kaj semas por pli bela estonto de la nova kontinento.

R.P.

### K I O N N I F A R O S ?

Jam dum kelkaj monatoj mi cerbumis pri ĉi tiu temo: ĉu skribi ĉu ne? Ĉu mia artikoleto iom efikos? Sed leginte la lastan numeron de "VOJO, VERO, VIVO", speciale la informon de la I.K.I.-kasisto pri la ne-apero ĝustatempe de la sekvanta numero 43 pro manko de mono, mi ne plu hezitis. Sed kiel mi skribu? Ĉu mi petegu laŭ t.n. almozprediko, kiel ni ĉiuj tiel bone konas, ne nur de sur la katedro, sed ankaŭ per la radio? Ĉu mi tintigu monkolletojn? Ho ne!!! Nur unufoje mi petegis al la nederlanda katolika esperantistaro donacon en Majo 1950a. La tuta biblioteko de la katolika sekcio en Rotterdam estis forbombardiĝinta. Kaj la respondo? Pli ol 100 libroj alvenis por anstataŭigi ĝin. Sed nun temas pri io tute alia. Certe vi legis pri la nova esperanto-monumento en Wörgl. Tiu fakto eble ĝojigis vian esperantan koron. Vi kune fieris. Sed ek de 1934 ni katolikoj posedas multe pli gravan monumenton esperantistan! Niaj protestantaj kunfratoj envias nin pro ĝi kaj eĉ sin preparas imiti ĝin. Sed ni ne sufiĉe atentis ĝin, ni eĉ preskaŭ forgesis ĝin, ni ne bone konservadis ĝin, kaj sekve ĝi estas en granda danĝero, ĝi pereos. Katolika pastro iam diris al mi: "Ni katolikoj ne bezonas esperanton!" Eble ne ni mem, sed jes la ne-katolikoj bezonas nin, ankaŭ pere de esperanto! Se ili deziras, ili devas havi la okazon por informiĝi pri la katolika kredo, kaj ni havas la devon defendi la kredon ankaŭ pere de esperanto. Tia estas la ekzistrajto eĉ la ekzistdevo de nia I.K.I. Tion pruvas la centoj da informpetantoj, kaj certe tiuj, kiuj trovis aŭ retrovis la Pacon en la Vero pere de I.K.I. kaj ties senkostaj kaj senlacigantaj informadoj. Speciale la katolikaj esperantistoj de Nederlando havas devon subteni kion ili fondis. Tamen al tio ili ege bezonas la kunhelpon de ĉiuj katolikaj esperantistoj en la mondo. I.K.I. estas la honoro de la katolika esperantistaro! Katolika esperanto-movado sen I.K.I. estas nur esperanto sen pli. En tia esperantomovado oni ne bezonas la vortojn kaj esperimojn katolikajn, ĉar la plejmulto ne komprenas ilin. Ni malpravigu tiun eldiron, ni montru ke ni komprenas nian devon, por ke multaj nekatolikaj esperantistoj ricevos la informojn al kiuj ili sopiras. Nia I.K.I. seninterrompe daŭrigu sian laboron. Ni agu same!

E. Haalebos - v.d. Woestijne.



## PRIPAROLAS LA LINGVAN PROBLEMON EN LA INTERNACIAJ RILATOJ

La ĝenerala kunveno de Unesco nun estas en Parizo. Sur la tagordo estas la decido pri iom stranga petskribo. Sur ĉiuj folietoj estas la sama teksto, sed ĝi laŭtas en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo. Subskribis ĝin 895.432 individuoj kaj 492 grandaj organizoj kun 15.454.780 membroj. Entute do 16.350.212 viroj kaj virinoj el 76 landoj subtenas ĝin. Inter la subskribantoj estas kvar ministroj-prezidantoj, i.a. d-ro W. Drees (de Nederlando, kiu mem estas esperantisto), la prezidanto de Francujo, Vincent Auriol, pli ol 400 parlamentanoj kelkaj miloj da profesoroj, kuracistoj, advokatoj, inĝenieroj, instruistoj, ktp., kelkaj dekmiloj da laboristoj, ktp.

Milionoj da homoj de ĉiuj rasoj, nacioj kaj lingvoj, de ĉiuj religioj, de ĉiuj profesioj esprimis en ĉi tiu dokumento la esperon ke la kompetentaj internaciaj instancoj dediĉos baldaŭ ankaj seriozan diskuton al la lingva problemo. La subskribantoj petas ke tiuj instancoj alkuraĝigos la instruadon de la internacia lingvo Esperanto en la lernejoj kaj evoluigos la praktikan uzadon de tiu lingvo en la internaciaj rilatoj.

Je la 2a de Aŭgusto 1950a la petskribo estis solene donata al la Oficejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Lake Success. Post kelkaj tagoj - la 8a de Aŭgusto - s-ro Benjamin Cohen, vic-ĝenerala-sekretario de la U.N., sendis la dokumenton al la Unesco, kiel la kompetenta instanco en ĉi tiu afero. Kaj nun la ĝenerala kunveno en Parizo decidis pri ĝi. Certe la Unesco nuntempe estas la plej kompetenta internacia oficiala instanco por preparoli la gravan problemon. Ĝia tasko estas akceli la internacian kunlaboron per instruado, scienco kaj kulturo. La sperto instruis ke unu el la plej grandaj baroj por atingi ĉi tiun celon, estas speciale la lingvaj malhelpoj. Tion bone scias ĉiu, kiu parteprenas al internaciaj kongresoj kaj konferencoj, aŭ kiu iamaniere laboras en internaciaj medioj, kie fremda lingvo estas uzata. Kaj kiom da tiuj estas nuntempe! Sed tio ankaŭ konscias la vojaĝanto, la simpla turisto, la radion-aŭskultanto, la kinon-vizitanto . . . Fakte ĉiu civilizita persono. Sufiĉas por legi la tag-jurnalojn por akiri plurajn pruvojn pri la kreskanta aktualeco de la lingva problemo en la internacia vivo. Kaj la baza programo de Unesco plurloke rekonas tion. En oficialaj internaciaj organizoj la lingva haoso hodiaŭ estas pli granda ol antaŭe. (Ĉe la U.N. 5 oficialaj lingvoj; en la Komunumo por Karbo kaj Stalo 4 oficialaj lingvoj; en la Internacia Tribunalo en Hago 2 lingvoj, ktp.) Oni klopodis plimilgidi la efekton per teknikaj rimedoj. Tamen pruvis ke nenia aŭskultilo, nek la plej bonaj tradukistoj, scipovis anstataŭi la potencon de la vivanta lingvo, nek la efekton de la direkta vorto. Ni nur preterlasu la erarojn, eĉ fatalajn erarojn, kaŭzita de neĝustaj tradukoj. Intertempe oni baraktas senhelpe kaj vane por serĉi eliron, parte kaŭzite de nacia fiereco kaj konkurenco, neglektante la grandajn malfacilaĵojn de la naciaj lingvoj. Dum ke kreskanta nombro da homoj sen antaŭjuĝoj agnoskas la solvon, kiu donis al ni d-ro L.L. Zamenhof.

Esperanto, la sole vere internacia lingvo, ne nur laŭnome, sed ankaŭ laŭ sia strukturo kaj apliko, havis siajn sukcesojn, malgraŭ multaj baroj. Kontraŭ la Internacia Lingvo estis la natura suspekto, du mondmilitoj, internaciaj maltrankviloj, eĉ direktaj persekutoj de diktatoraj reĝimoj. Favore al ĝi nur estis ecoj, kiuj rezultigis el ĝi mem: ĝia fakta internacieco, la facila kaj genia simpleco, ĝia kompleta taŭgeco por ĉiaj bezonoj de la vivo. Eble ankaŭ: la homameco, la internacia sento ne nur

intelekte, sed ankaŭ sente, bazita je kompleta respekto por ĉiu homo, sen distingo de raso, religio aŭ lingvo, al kiu li apartenas laŭ sia naskiĝo. La nuda projekto Esperanto baldaŭ fariĝis vivanta lingvo. Hodiaŭ ĝi posedas riĉan literaturon, ĉu tradukitan ĉu originalan, kiu montras grandecan mozaikon formita el la plej valoraj juveloj naskitaj de la homaro. En la internacia lingvo aperas revuoj diversfakaj kaj -tendencaj. Pluraj radio-stacioj dissendas siajn kulturajn programojn en Esperanto. Diversaj kongresoj kaj konferencoj okazas ĉiujare kaj oni nur uzas la internacian lingvon. Fortaj specialaj organizoj, ekz. de scienculoj, kuracistoj, instruistoj, ĵurnalistoj, k.a., uzas Esperanton por siaj specialaj celoj. En la Internacia Somer-Universitato diverslandaj scienculoj prelegas. Poetoj parteprenas la internacian konkurson en la belaj artoj. Ĉiutage la lingvo estas uzata praktike sub la plej diversaj formoj kaj ĝi donas grandegajn profitojn al siaj praktikantoj.

Jen la faktoj! Jen la realo! Se tiu realo - pro nescio aŭ pro intencita neglekto - ne estas vidata aŭ ne ricevas sufiĉan atenton, ne signifas kompreneble ke tiu realo ne ekzistas.

Ŝajnas al ni, ke fine tiu kompatinda stato devus kaj povus finiĝi, kie eĉ la plej eminentaj intelektuloj sin sentas kvazaŭ barbaroj en rondo kie fremda lingvo estas uzata. Ŝajnas al ni ke la fakta partopreno al la internacia vivo nuntempe estas rajto de ĉiu kaj ne nur de kelkaj personoj kiuj havas la feliĉon scii la rilatajn fremdajn lingvojn. Certe tio donos stimulon al la kultura progreso kaj al la morala unueco de la mondo! Tamen tiuj celoj restos belaj frazoj se oni tiucele ne uzas komunan, neŭtralan, simplan lingvon en vastaj rondo.

La Unesco devos preni gravan decidon. Ĉu la ĝenerala kunveno havos sufiĉe da kuraĝo por akcepti solvon, kiu sin prezentas ĉirkaŭita de spertoj kaj faktoj, kaj kiu signifus kultura evoluo de la homaro? Ne nur la 16 milionoj, en kies nomo la petaskribo estis transdonita al la Unesco, sed multe aliaj milionoj atendas ĝian respondon.

(N.K.-UEA.)

## FAKTOJ EL LA MOVADO

De 1946a ĝis 1950a estis vigla esperanto movado en Koreujo, kun la centro ĉe la universitato de Seoul. Je la eksplodo de la milito, la 25an de Junio 1950a, ĉiu rezultato malaperis. Ek de Marto 1951a la movado reviviĝis en la universitatoj de Taegu kaj Pusan. Certe ĉiu komprenas ke la samideanoj malhavas la necesajn librojn. Oni enkondukis jenan solvon. Per ofset-presado oni multobligis la lernolibron "Tra la Jaro" de Lucy E. Waddy, kaj antaŭe eldonita en Usono, Kanado, Aŭstralio kaj Britujo. La lernolibro estas laŭ la direkta metodo. Oni volas ekspedi ĉi tiun libron tra la mondo interŝanĝe libroj. Personoj kiuj volas helpi sin turnu al prof. o Hengwi Hong, Chunggu Universitato, TAEGU, Koreujo.

En Nova Zelando komenciĝas 10-leciana Esp.kurso kun pli ol 60 personoj en la urbo Auckland, ĉe Auckland University College. Gvidanto estas s-ro J. Hamval, kiu forte helpis en 1938 al la Unua Eŭkaristia Mondkongreso de Katolikaj Esperantistoj en Budapeŝto.

La Londona Esperanto-Klubo, fondita la 12an de Januaro 1903a, festos sian 50-jaran jubileon je la paskaj tagoj de 2-6-Aprilo venonta. Ili esperas gastigi diversajn eksterlandajn samideanojn.

En Septembro prof. o Fuĵio Egami de la universitato de Nagoya prelegis en Kopenhago pri "La vivkondiĉoj de studentoj kaj profesoroj en Japanujo". Diversaj danaj ĵurnaloj intervjuis lin.

La urbestro de Lourdes sendis al ĉiuj siaj kolegoj en Francujo cirkuleton kun la du demandoj: 1. Ĉu vi bonvenas la ĝeneralan adopton de la lingvo? Ĉu vi volas subteni leĝprojekton, kiu ebligas al ĉiuj lernejoj fondi esperantolecionojn, komencante je la instruistaj seminarioj? Ni scivolas la respondojn.

# LA EVOLUO DE ESPERANTO KAJ AKADEMIO

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

En la ĉiujara kongreso de "Societo por la progresigo de la scienco" en Edinburg estis konstatate, pro la egaj sciencaj ekkonoj lastjaraj, ke la materialismo en la scienco estas transpaŝita.


Ĉe tiu ĉi kongreso, antaŭe renkontejo por la mokado pri la religio, katolikaj kaj nekatolikaj scienculo konfesis, ke la mondo post la milito pli kaj pli malproksimiĝas de la malnovaj teorioj de l'ateismo kaj aspiras scienccon sur religia fundamento. Laŭ ili scienco, kiu povas servi al la detrudo tiom, kiom hodiaŭ, ne rajtas ekzisti sen la fido al potenco plej alta al kiu ĝi devas respondi. Viscont Samuel diris, ke Rusujo, opiniante sin supera pri la mondo cetera kaj kredante, paroli la lastan vorton en filozofio kaj ekonomio, vere postrestas cent jarojn, ĉar ĝi ne atingis trans la doktrinojn de Karl Marx. Sed nuntempe ankaŭ la scienculo sopiras spiritajn kaj animajn valorojn. La rektoro de l'universitato Edinburg John B a i l l i e diris: "Kiam la fido lamiĝas, fine lamiĝas ankaŭ la sciencista impulso. Se niaj celoj ne orientiĝas laŭ la fido, se anttataŭ sanktaj devoj homaj interesoj decidigas, tiam la scienco fariĝas mortigilo en la mano de l'homo. Ĉiuj hodiaŭ ni vivas kun la timo, ke la potenco kiun la scienco disdonas, kaptiĝas de homoj, kiuj ne rekonas neforigeblajn kondiĉojn kaj moralajn konsiderojn opinias rilataj. Eble la ideo nin konsolas, ke sub tiaj kondiĉoj la scienco ne povas prosperi. Kiam la celoj, al kiuj ĝi servas, koruptiĝas, tiam koruptiĝas ankaŭ ĝiaj impulsoj, la pura impulso perdiĝas. La virtoj, kiuj estas necesaj por la progreso de la scienco, estas la kristanaj virtoj de l'humilo, malegoismo, toleremo, justeco kaj de komunumo, kiun malhelpas neniam diferencoj de la klasoj, rasoj aŭ nacioj."

D-ro A.E. Bell, sciencisto de la primilit -kaj general stabinstituto en Sandhurst (Anglujo) rifuzis, la sciencaj instruadon taksi kiel preparadon por speciala profesio. La senco de la scienca klerigado estas, plivastigi la horizonton de la studentoj, konsiderigante la universon kaj la rilatiĝecon de la homo pri l'universo. Profesoro Donald M. B a i l l e atentigis, ke la zorgo pri konflikto de sciencaj ekkonoj kun la kristanaj dogmoj jam tre amplekse malaperis. La streĉeco inter fido kaj scio ne plu ekzistas kiel pli frue. La luktado de ambaŭ hodiaŭ okazas en la animo de l'homa individuo. La sciencaj ekkonoj, speciale en la sfero de la psikologio, ja estigis en kelkaj homoj dubojn pri la malfalseco de la religio. Sed se oni demandas, ĉu eble estas Dio nur projektaĵo aŭ la kredo rifugo en la fantazion, tiam oni ekzamenu ankaŭ, ĉu la senkredeco eble ne estas rifuĝo pro la realo. La skeptikismo bezonas la psikanalizon ne malpli al la kredo. La papan akademion de la sciencoj reprezentis ĝiaj membroj profesoroj Hugh T a y l o r de la universitato Princetown (USA) kaj Edmund W h i t t a k e r de l'universitato Edinburg. En sia raporto pri la kongreso la "Times" skribis, ke ofte estas nevidate, ke la scienculoj same respondiĝas pri siaj kiel aliaj homoj kaj ke la scienco mem devas esti regata de pli alta saĝo. "Catholic Times" en London deklaris per ĉefartikolo, ke en la moderna mondo politiko, ekonomio kaj natursciencaj detronigis la teologion, kiu tamen estas la reĝo de la sciencoj.

El "Blick in die Zeit", Berlin. Dr. A.H.



## LA ORDENO DE LA KAVALIROJ DE LA SANKTA TOMBEJO



Dum la mezepoka tempo en Eŭropo kaj en la Oriento fondiĝis kelkaj ordenoj de kavaliroj. El ili ni konas certe la Templaj, la Johanitaj kaj la Marianaj Kavaliroj, kiuj reprezentis la ideon de la kristana kavaliroco en la historio. Kelkaj el la ordenoj de la kavaliroj malfondiĝis en la pli malfruaj tempoj, aliaj ordenoj ekzistas ĝis hodiaŭ. La Johanitaj Kavaliroj nomiĝas hodiaŭ ofte "Maltesaj Kavaliroj", ĉar post la perdo de la Sankta Tero al la Mohamedanoj ili foriris unue al la insulo de Rodo (en la orienta parto de la Egea maro) kaj poste al la insulo de Malta, en la sudo de Sicilio.

Unu el ĉi tiuj ordenoj de la kavaliroj estas la ordeno de la kavaliroj de la Sankta Tombejo en Jeruzalemo, kiu ankoraŭ ekzistas. La ordeno fondiĝis en la 12a jarcento de nia kristana tempo. Estis kutimo, ke la kavaliroj el la eŭropaj landoj, kiuj iris al la Sankta Tero, en la Eklezio de la Sankta Tombejo ricevis la honoron de la kavaliroco el la mano de la patriarko de Jeruzalemo. Multaj famkonatoj el ĉiuj eŭropaj landoj revenis kun la kruco de la kavaliroj de la Sankta Tombejo. La ordeno posedas "Grandan Mastron" kaj "komturojn" en la diversaj naciaj landoj. Ankaŭ kiam la kristanoj perdis la Sanktan Teron al la mohamedanoj, unuopaj kavaliroj iris al la Sankta Tero kaj ricevis la kavalirocon de la Sankta Tombejo. Sed en la 16a jarcento la katolika Eklezio decidis, ke la sola instanco, kiu havas la rajton de la honorigo de kavaliroj estonte, estu la latina patriarko de Jeruzalemo.

Ankaŭ en niaj tempoj la Eklezio, t.e. la "grando mastro" de la ordeno de la kavaliroj de la Sankta Tombejo en Jeruzalemo en la nomo de Lia Papa Moŝto nomigas kavalirojn de la Sankta Tombejo. Antaŭ kelkaj monatoj, en Aŭgusto 1952, en la malnova urbo de Salzburg, la ĉef episkopo dro.

Rohracher, kiel prioro de la ordeno en Aŭstrujo, honoris kelkajn famkonatajn aŭstrajn katolikojn en la nomo de kardinalo Nikolao, C a n a l i la estanta "granda mastro" de la ordeno de kavaliroj de la Sankta Tombejo, tialmaniere, ke li deklaris ilin kiel kavalirojn de la Sankta Tombejo. Inter ili estis la Aŭstra federacia instrumministro dro. Kolb, la ĉefestro de la aŭstra liglando Styrio Krainer, la eldonisto Otto Müller en Salzburg kaj aliaj. Ankaŭ nia samideano dro.

E. J. G ö r l i c h, lektoro pri Esperanto en la ŝtataj altlernejoj de mondkomerco kaj agrikulturo en Wien kaj vice-prezidanto de la Aŭstra Katolika Ligo Esperantista estis honorita samtempe kiel kavaliro de la Sankta Tombejo.

Rico Bulthuis: LA ALIA PASINTECO.

La plej juna filo de la konata Esperanto-verkisto H. J. Bulthuis, mortinta en la fino de la lasta milito, verkis ĉi tiun tre interesan romanon en nederlanda lingvo. Temas pri viro kiu perdis sian memorkapablon kaj tial falis en la manojn de la polico, kiu suspektas lin pri murdo kaj opinias lin ruza simulanto; poste oni transportis lin al frenezulejo. La verkisto bazis la temon sur la realeco koncerne al la medicina kaj psikologia flankoj. Li konsultis ekspertojn kaj laŭ la opinio de dro Paul Dietz li bonege sukcesis en sia malfacila tasko: la verko estas streĉa, la konkludo logika kaj surpriza. Sinjorino Julia Isenbrücker, akademianino, prizorgis la Esperanto-tradukon kaj ŝia nomo estas garantio por bonega lingvo kaj flua stilo. La libro, 292-paĝa, presita sur bonega papero en klaraj karakteroj, estas havebla ĉe nia Libro-Servo por la prezo de f. 4.90 + sendkostoj, bindita.

T.D.

La Akademio de Esperanto oficialigis la sufikson-*end-* kun la difino "kiu devas esti -ata pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata -i" Estonte do ne plu estos neologismoj frazoj kiaj "la tasko estas farenda" "la regulo estas forigenda" aŭ "la libro estas legenda". (Atentu tamen! La lasta frazo estas dubesenca.) La decido pri la nova sufikso altiras atenton al la rolo, kiun la Akademio ludas en la evoluó kaj progreso de Esperanto. Oni ofte aŭdas la kritikon, ke ĝi "funkcias malbone", ke ĝi "ne estas sufiĉe aktiva" kaj ke ĝi "estas tro konservativa". En la voĉdono pri -*end-* partoprenis 40 Akademianoj. 22 voĉdonis por la oficialigo kun la proponita difino; du voĉdonis por la oficialigo, sed ne akceptis la difinon; 16 voĉdonis kontraŭ la oficialigo. La tri usonaj Akademianoj "disfalis" en tri grupojn: S-ro Scherer voĉdonis "jes". D-ro Lippmann akceptis la oficialigon, sed ne la difinon, kaj mi voĉdonis "ne". La kaŭzo de mia ago ne estis principa kontraŭstaro kontraŭ -*end-*, sed la opinio, ke plua studado de la problemo estas dezirinda kaj ke la afero ne estas urĝa. Komprenoble mi nun volonte akceptas la decidon de la plimulto. Dum la 47 jaroj de la ekzisto de niaj lingvaj institucioj, la Lingva Komitato kaj Akademio (nun nur plu ekzistas la Akademio) oficialigis nur unu prefikson kaj tri sufiksojn: -*aĉ-* en 1910, -*ism-* en 1914, -*mis-* en 1929, -*end-* en 1952. Krome la Lingva Komitato akceptis 6 Aldonojn al la Oficiala Vortaro, oficialigante proksimume 1500 radikojn. Ĉar la Oficiala Vortaro enhavas proksimume 2800 radikojn, la tuta nombro de oficialaj radikoj en Esperanto nun estas proksimume 4300. Multaj Esperantistoj riproĉas al la Akademio, ke ĝi "ne multe faras", ke ĝi oficialigas radikojn "tro malfrue" kaj ke ĝi "ne zorgas pri la pliriĉigado de la lingvo". Ili atentigas, ke la lingvo daŭre kreskas per la apero de novaj vortoj en libroj kaj gazetoj, kaj diras, ke la Akademio devus rapide sankcii aŭ malpermesi ilian uzadon. Oni povas respondi, ke en la nuna tempo estas preferinde, ke la Akademio faru tro malmulte, ol ke ĝi faru tro multe, ĉar stabileco estas pli grava daŭra kreskado. Kelkaj Esperantistoj emas troigi la "enpenetron de neologismoj en praktikan uzon". Se unu aŭ du verkistoj uzas neologismon en siaj libroj aŭ tri gazetoj uzadas ĝin, tio tute ne sufiĉas por pruvi ĝian ekzistorajton. Eĉ se preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj akceptus iun radikon, oni ankoraŭ povus esti hezitema. Laŭ bone konata diro de Edmond Privat, Esperanto estas "vivanta lingvo de vivanta popolo". Tio estas vera - sed ne tute. Esperanto estas vivanta lingvo por kelkaj homoj, dormanta aŭ duone dormanta lingvo por aliaj. Permesu al mi klarigi tion. Nur malgranda parto de la personoj, kiuj lernis Esperanton, uzas la lingvon konstante. Esperantistoj, kiuj uzas Esperanton ĉiutage, abonas pli ol unu Esperanto-gazeton, aĉetas kaj regule legas la plej gravajn nove aperantajn librojn, ne estas multnombraj. Ni diru, ke tiu kategorio konsistas el 10,000 personoj. Pli multnombraj estas tiuj, kiuj iom partoprenas en la organizita Esperanto-movado, legas almenaŭ unu Esperanto-gazeton regule kaj Esperanto-librojn de tempo al tempo. Ni supozu, ke ilia nombro estas 50.000. Tria kategorio konsistas al tiuj, kiuj ne estas membroj de iu asocio aŭ klubo kaj ne abonas Esperanto-gazeton, sed uzas Esperanton okaze, kiam tio ŝajnas al ili utila. Ili havas en siaj libroŝrankoj lernolibrojn kaj aliajn Esperanto-librojn. Ili tamen malfermas ilin tre malofte. La nombro de tiuj "dormantaj" Esperantistoj estas granda, eble duon-miliono. Oni povas bedaŭri, ke ili ne estas aktivaj, sed oni ne povas nei, ke ili ekzistas kaj formas pasivan, sed ne tute senvaloran rezervan armeon. Fine ekzistas tiuj personoj, milionoj da ili, eble multaj milionoj kiuj iam lernis aŭ komencis lerni Esperanton, sed perdis intereson kaj forgesis prokaŭ ĉion. Nur en esceptaj cirkonstancoj Esperanto estos utila al ili. Se iu el ili retrovas sian intereson pri la lingvo kaj movado la klopodo, kiun li devas fari por lerni Esperanton, tamen estos malpli granda ol la klopodo de persono, kiu komencas la studon sen antaŭa scio.

Ekzamenante la problemon de neologismoj de la vidpunkto de tiuj kvar kategorioj; ni vidas, ke nur la anoj de la unua kategorio regule havas kontakton kun novaj radikoj enkondukataj en la lingvon kaj povas permesi al si iomete kompetentan juĝon pri ilia dezirindeco aŭ nedezirindeco. Nur parto de la dua kategorio estas en la sama situacio. Personoj, kiuj legas "Brazilan Esperantiston" aŭ "Francan Esperantiston", sed nenion alian Esperanto-gazeton, scias nenion pri lingvaj studoj en "Esperanto" de UEA aŭ pri neologismoj uzataj en "Heroldo". Anoj de la tria kategorio eble nur rememoras tion, kion ili lernis en lernolibro publikigita en 1912. Ili neniam aŭdis pri la prefikso -mis-. la sufikso -end- aŭ vortoj kiaj varo, grego kaj inundi. Esperanto estas por ili simila al la latina lingvo, kiun kelkaj el ili iam studis, sed ne al la gepatra lingvo kiun ili parolas ĉiutage. Se ni sukcesos multe pligrandigi ne nur la nombron de tiuj, kiuj lernas Esperanton, sed eĉ pli la nombron de la konstantaj uzantoj, la situacio aliĝos. Kiam gravaj komercaj firmoj, sciencaj organizoj, internaciaj kongresoj ktp. grandskale uzos Esperanton, kiam la scio de la lingvo prezentos pli grandan praktikan, eĉ financon profiton, tiam Esperanto rapide fariĝos vivanta lingvo de centmiloj da personoj. Tiam fariĝos necese, ke la Akademio laboru pli multe kaj pli rapide, ke ĝi oficialigu novajn vortojn, prefiksojn kaj sufiksojn por kontentigi konstante ŝanĝigantajn bezonojn kaj ke ĝi starigu efikan kaj kompetentan organizon por gvidi kaj observi projektojn pri fakaj vortaroj. Ĝis, tiu tempo, laŭ mia opinio, la Akademio devos resti precipe garantianto kaj defendanto de la Fundamento. Ĝi oficialigos nur tiujn radikojn, kiuj estas nepre necesaj por esprimi novajn aspektojn de la moderna vivo, kaj ĝi daŭre admonos la neologismemulojn, ke ili uzu sian energion kaj sian talenton por pliperfektigi en la Zamenhofa Esperanto, anstataŭ proponi fantazie elpensitajn novajn radikojn "nepre akceptendajn".

El "Amerika Esperantisto".

## NEKROLOGO

### MORTIS BONA HOMO.

Unu el la pioniroj de la Katolika movado en Nederlando mortis 76-jara la 10<sup>ma</sup> de Septembro nunjare en Hago

Francisko Jozefo Mario MARREVEE.

Profunde pia homo, kiu vivis por Dio kaj por sia kara edzino. Simpla, modesta, humila, servopreta li estis. Mi havis la veran privilegion koni lin kaj esti lia amiko jam en nia komuna naskiĝurbo Schiedam. Ni ambaŭ tie fondis esperantoklubon kaj akiris en la sama ta-

go la B-diplomon (1912). Niaj vojoj poste disigis, tamen ni retrovis nin en la ĉefestraro de Nederlanda Katoliko, en la ekzamena komitato kaj en la kongreso de I.K.U.E. (1937) en Hago, en kies preparo li havis grandan parton. Tiu bona homo forlasis je kelka tempo sian karan edzinon; poste ili denove renkontiĝos en la ĉielo por ĝui kune kun la anĝeloj kaj sanuloj la eternan feliĉon ĉe Dio. Nian kodolencan sinderan ni esprimas al sinjorino lia edzino, nia preĝo kiel deca danko pro lia laboro iru al antaŭ la trono de kompatema Dio.


P. Heilker  
(Soestdijk)

Ankaŭ ni funebras pro la morto de s-ro Fr.C.D.Smarius el Tilburgo, kiu havis grandan parton en la preparo de nia kongreso en 1928a en tiu urbo. Mortis ankaŭ f-ino M.Zaat el Voorburg (Nederlando) kaj pastro Ludwig Kolb en Ludwigshafen (Germanujo).  
Ili ripozu en paco!

Du sciencaj revuoj nun donas Esperantajn resumojn: Unu temas pri la zoolo-  
giaj rezultatoj de Sveda Ekspedicio al la Antarktiko, alia estas raporto  
de la Fitopatologia Laboratorio J.E.Olsons Enke en Kopenhago.

La prezidanto de la Itala Respubliko, s-ro Luigi Einaudi, ricevis grupon  
da notindaj italaj esperantistoj. Je la fotografaĵo ni kun ĝojo rekonis  
diversajn personoj kiuj varme propagandas nian katolikan movadon. i.a. pa-  
tro Carolfi, s-ro Minnaja kaj filo, s-ro Blassime, prof.o Musella,  
prof-ino Antonelli, s-ro Bagnulo, k.a.

La Esperanto - Instituto de Medicina Fako de Niigata Universitato eldonas  
propran organon kun diversaj sciencaj artikoloj. La organo portas la taŭ-  
gan nomon de "La Hemoglobino".



24<sup>a</sup> IKKE

12-16 Aŭg  
1953

La datoj estas definitive fiksitaj de 12-16 Aŭgusto 1953.  
La ĝenerala aranĝo staras sub komitato de la Franca Ligo de  
Katolikaj Esperantistoj, kies prezidanto estas kanoniko  
Duvaux en Parizo, kaj la religia konsilanto patro  
Jean Vernoux SCJ. en Lille. La Lokan Kongreskomitaton gvidas  
s-ro A.Hasaers en Lourdes. La kongreskotizo estas jena:  
ĝis la la de Februaro 1953a 700 francajn frankojn.  
de I-II ĝis I-V-1952 900 francajn frankojn.  
post la de Majo 1953a 1100 francajn frankojn.  
Oni povas pagi al la adresoj de niaj reprezentantoj, kies  
adresojn oni trovas sur sia membrokarto kaj kuponaro. (por  
Usonovidu alie) Oni klopodas aranĝi tiel ke la parteprenantoj  
loĝos komune en la samaj hoteloj. Cio devas esti en ordo  
antaŭ la komenco de la nova sezono en Lourdes. Ĉiu ricivos  
ĝustatempe siajn kongresdokumentojn perpoŝte.

#### ADMINISTRACIAJ KOMUNIKOJ

La adreso de nia reprezentanto en USONO ŝanĝiĝis; ĝi tekstas nun:  
s-ro P. Golobic, 27724 Grovewood Ave, CLEVELAND 19 (Ohio).

La plimulto de la abonoj finiĝas je la jarfino. Ni petas ke oni pagu ĝus-  
tatempe, prefere jam nun, por ke ni sciu je la komenco de la nova jaro,  
al kiu ni sendu la membrokarton. La kotizojn vi trovos sur via mem-  
brokarto. Kaj se vi ne posedas membrokarton, tio signifas ke vi estas  
unu el tiuj malmultaj personoj, kiuj ankoraŭ ŝuldas la jaron 1952an.  
Tiam vi certe forgesis ion, kaj fidis tro je nia indulgemo.

#### RADIO

La elsendhoroj de la Katolika Radio Stacio- HILVERSUM (Nederlando) ĉiam  
estas la samaj. Ĝis la 31a de Decembro la ondolongo estas 402 m. post tiu  
dato 298 m. La horoj estas sabate 23.15 h. Bonvolu raporti!



## KORESPONDADO

Katolika Esperanto Grupo de San Juan Baptista, gvidanto s-ro  
José L. Aldeguer Jaen, Plaza del Norte, BARCELONA (Hispanujo) k.ĉ.1.  
p.ĉ.t.